Aŭstraliaj Esperantistoj

Federacio de Aŭstraliaj Esperantistoj
Nia Espero Nia Forto

Novaĵa Letero de Federacio de Aŭstraliaj Esperantistoj
NI SENDAS AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KUN KONATA RETADRESO
http://beta.visl.sdu.dk/lingvohelpilo/
auto 8/02/2013 Naŭdekoka Eldono 2012 9/02/2013 SENDITA

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rspring@tpg.com.au;

Provlegita de Nicole Else
La informa kaj noma paĝoj nur aperos en la dekaj eldonoj

GRAVAJ DATOJ vidu Tamen Plu redaktas Katarina Taggart

Se vi ne ricevas Tamen Plu aŭ 'Aŭstraliaj Esperantistoj', aŭ ricevas dufoje, informu AE.


Skribu, informu 200 retadresaranojn de AE pri viaj novaĵoj

Vi apartenas al la Esperanta Familio de Aŭstralio. Komuniku

00 Brunaj literoj signifas reuzata sed grava informo
Nigraj literoj signifas nova aŭ ĝisdatigata informo


ALKLAKU la hiperligilojn markitajn tiel

AŬSKULTU, LEGU ESPERANTAN RETRADION TAGE




Informaj rakontetoj, Bona lingvo, http://members.aon.at/aldone/peranto/index.html

Esperantaj-RetRadioj. http://esperanto-radio.com/



Inter ili estas la Pola RetRadio, Radio Vatikano, 3ZZZ, Varsovia Vento, Radio Havano Kubo kaj la Kaliningrada E-radio.
Ankaŭ radio Muzaiko



Jen kanto pri esperantisto (Jonathan Moylan)
http://www.youtube.com/watch?v=RSZaNYk651c

KLUBNOVAĴO





Informas la aktivaj kluboj kaj grupoj

La kluboj respondecas pri la ĝisdatigo de la anoncoj

La kluba listo kreskas





Ĉu via klubo/grupo kunvenis? as? os?

Maldetala informo sufiĉas. Kiuj ĉeestis? (Ankaŭ NZ kluboj) rspring@tpg.com.au

Ĉu ĉiu en via grupo ricevas la Novaĵleteron?

Se iuj hazarde volas viziti vian klubon. Ĉu la detaloj ĝustas?



3ZZZ Retradio Melburno

Esperanto-programo estas dissendita de Melburno ĉiun lundon de la 1a ĝis la 2a posttagmeze je 92.3 FM, kiel ero de la multkultura radio 3ZZZ. Por la nemelburnanoj ĝi audeblas per la reto je www.3ZZZ.com.aŭ dum la sekva semajno aŭ iam ajn en la arkivejo www.melburno.org.au dank'al la ligoj de reta radio.

Por ekzisti ĝi bezonas almenaŭ 40 membrojn kaj bezonas arigi ĉiun oktobron $1000. Se vi pensas ke radio estas subteninda ilo por esperantistoj, nepre membriĝu irante al la retejo www.3ZZZ.com.au. La komitato de la Esperanto-radio en 3ZZZ antaŭdankas vin.



Central Coast Esperanto Club

kunvenos 2ptm dimanĉon la 10an Feb 2013 Bamboo Buddha Café

221 Wattle Tree Road, Holgate NSW 2250



La Brisbana Esperanto-Societo

Ni nun havas Facebook paĝon kaj ankaŭ, ni estas ĉe www.meetup.com/Brisbane-Esperanto-Society/

Kay Anderson



La Tasmania Esperanta Societo

kunvenas, ĉiun jaŭdon je la Metz trinkejo, Sandy Bay.

Je la 7-a ĝis 8:30 ĉe Metz kaj poste ni kutime kune vespermanĝas...

Roberto Budzul



La Melburna Esperanto Klubo

La Melburna Esperanto Klubo renkontiĝis ĉe Ross House je 6.30 ptm lunde.
Heather Heldzingen



Esperanto Kafo Klubo de Kanbero

kunsidas ĉiujn vendredojn je la 5a ptm en Cafe Fontaine kiu troviĝas en la plej supra nivelo de la Canberra Centre.



La Manlia Esperanto-Klubo Ĉiuj bonvenaj.

Unu taso da senpaga kafo Bavarian Beer Cafe, Manly Wharf; Manlio kunvenos la 9an de Februaro.

Junaj vizitantoj ĝis 30 jaraj estas invitataj al senkosta matenmaĝo (ĝis 15 dolaroj).
Dankon al La "Rainer Kurz Stiftung zur Förderung des Esperanto"



Esperanto-Domo Sidnejo

Amuztago 24an de Februaro 12ptm ĝis eble 4ptm

BBQ lastaj dimanĉoj de la monato



Torkio Esperanto Kafo Klubo - Viktorio

La Torkio grupo konsistas de lokaj loĝantoj kaj vizitantoj de Melburno.
Ni celas esti amikaj kaj agrablaj, kaj plibonigi nian esperantan kapablon.
Ni babilas pri kaj per Esperanto - kaj ni trinkas kafon!
tel 03 5261 2899 M 0421043272
https://sites.google.com/site/torquayesperantoweb/



La Adelajda Esperanto-klubo- 2013-02-06

La Adelajdaj esperantistoj kunvenis merkredon, la 6-an en la kutima loko, la "skatolfabriko".
Sandor prezentis bildojn pri sia vojaĝo al Novzelando, Trevor regalis nin per interesa kvizludo kaj Indrani raportis pri nia financa situacio.
Ĉeestis Trevor, Katja, Charles, Bob, Indrani, Sandor

ADELAJDA ESPEREJO

Legogrupo. En la Ŝtata biblioteko kunvenadas ĉiun ĵaŭdon
Max Wearing <mwearing@internode.on.net> tel (08) 8359-3375



Kluboj de Novzelando

?? post nelonge?

AEA Informas

Aŭstralia Esperanto Asocio

ACN 121 495 789 C/- G.P.O. Box 2122, Melbourne 3001

AEA raportas:

Nian unuan Skype estrarkunvenon en 2013 (07/02/2013) ĉeestis Heather, Indrani, Kam Lee, Margaret kaj Sandor.

La ĉefa diskutero estis la
Niaj aĵoj
Ni decidis ke ni pagos por la tuja sendado de la libroj de forpasinta Don Broadribb al Esperanto Domo en Sidnejo.
Ankaŭ nia arĥivo en Fort Knox estos baldaŭ transportita al Sidnejo

***Venonta Kongreso**
Nia venonta kongreso/somerkursaro okazos inter la 3 – 12 de januaro en Kanbero. Multajn dankojn al Huigh Malcolm, kiu serĉas taŭgan kongresejon.

*** Kompanio/Asocio**
Refoje, ni diskutis la meritojn de ambaŭ eblecoj.
Bv indiki kaj skribi vian opinion se vi subtenas asocion aŭ kompanion…

*** Nova membroformularo***
Ni diskutis kaj iomete ŝanĝis la formularon. Bv uzi ĝin kaj pagi vian kotizon

Ni daŭrigas la serĉadon por
*** Du novaj kunlaborantoj en la estraro**
Interesa laboro. Interesaj kolegoj. Interesa lingvo. Pensu pri ĝi kaj alparolu/sciigi nin.


Heather, Indrani, Kam Lee, Margaret, Sandor

Ĉu $241,600 aŭ pli? uzis AEA dum 7 jaroj 2005-2012 Ĉu oni deziras forgesi?



"Ankoraŭ interesas min eltrovi ĝuste kiom da mono estis donita al S-ino Vos kaj por ŝia (altekosta) libro kaj por ŝia privata firmao, kiu ankoraŭ havas ligon de la AEAa retpaĝo: ĉu Mondeto pagas por ĉi tiu reklamada ligo? Kiel AEAa membro mi kredas ke mi havas rajton al PLENA sciigo de la elspezoj de AEAa mono. Mi scias ke Indrani estas vere laboranta malfacile sur tio ĉi, do eble S-ino Lukes kaj S-ino Vos povas doni al ni ĉiujn finajn respondojn?"
Gordon Coleman Adelaide Tottenham Boy in Exile

Sydney Language Festival 2013



La NSK Federacio havas agadplanojn por ĉi tiu jaro. Ni organizos lingvan festivalon en Majo. Kaj mi jam komencis krei la retejon por tiu evento, Amike, Nicole vidu: http://esperantowebdesign.com/sydneylanguagefestival/

LETEROJ de la legantoj





Taŭga desegno aŭ foto, ne necesa, sed bonvena



Jen tie troviĝas la amuza kanto de Jonathan Cooper: Estas truo en la fundo de la mar' http://www.ipernity.com/doc/224665/14208936/

Amike, Nicole

Kaj jen tio kion mi (Nicole) filmis (18 sekundoj)
http://www.youtube.com/watch?v=kq2TEMNlzEU



Mi neniam renkontis Anthony, kiu sendube estis tre bona kaj amata homo. Al lia familio kaj geamikoj mi sendas miajn plej sincerajn kondolencojn. Vera Payne



Artikolo pri Trevor



http://www.prweb.com/releases/2013/1/prweb10372809.htm

sendis Nicole

Kion vi opinias pri la du kolora AE?? Roger Springer

Ponto

Esperanto-gazeto el Skandinavujo. Ĝi estas trilingva, sed vi eminentaj esperantistoj scias ja multajn lingvojn, ĉu ne? Kaj iom el ĝi estas ja en la internacia lingvo !

Plej amike, Bob (Mi sendas aparte. RogerS)

Where are you from?

Jen mia artikolo pri Indrani aperis sur la retejo Language on the move (Angle)
http://www.languageonthemove.com/language-learning-gender-identity/where-are-you-from

Amike, Nicole



“La Utilo de Sukoj”

de C. E. Clinkard, M.B.E.



En la 14a eldono de ĉi tiu libro presita kaj publikigita de Whitcombe kaj Tombs Ltd ©, 1960, de C. E. Clinkard, la teksto por “Sekvinbera Suko” donita sube estas interesa, ĉar dum la nuntempo sole medicinaj profesiuloj rajtas preskribi pri kancero kaj epilepsio, kaj rezulte la mencio de kancero estis ellasita en 2007-a eldono de Penguin.

“Sekvinbera Suko”

La suko de saturitaj sekvinberoj simile kiel la suko de vinberoj enhavas multvalorajn koncentritajn korpo-formajn elementojn, ĉefe feron. Ĝi estas rapida reviglilo kaj bone rekonata kiel bonfara refortigilo en kazoj de anemio kaj malalta vivoforto. Sekvinbera suko estas rekomendita ankaŭ por la mildigo de bruldolora gorĝo, kataro kaj astmo.

En kazoj de kancero la “Sukvinbera kuracilo” estas konsiderata de kelkaj aŭtoritatuloj esti plej helpa, kaj ĝi ankaŭ bone efikas ĉe alta sangopremo, hepataj malsanoj, konstipiĝo, menstruaj krampfoj kaj korpulenteco. Sekvinbera suko bonfaras ankaŭ por la vizaĝkoloro kaj estas bonega en kazoj de diareo kaj febro.

Sekvinbera suka koktelo: Trempu matenmanĝan tasplenon da sekvinberoj en akvo dum la nokto, kaj metu la sekvinberojn tra la ekstraktilo de sukoj, aldonante la akvon en kiu ili trempiĝis. Aldonu 3 servkulerojn da vinbera suko, 1 servkuleron da oranĝa suko, kaj pinĉprenon da muskato.


-oo0oo-

[Noto de Pamela la 29-an de januaro 2013: Mi ne entuziasmas pri la koktelo, mi preferas la sekvantan recepton: trempu proksimume unu aŭstralian servkuleron da sekvinberoj en citrona suko dumnokte. En la mateno aldonu varman akvon kaj sorbetu dum vestiĝo, uzante kuleron por manĝi la sekvinberojn. Vi povas trovi, ke tiom estas pli ol sufiĉo por matenmanĝo, sed kompreneble ekstraj sekvinberoj povas esti trempitaj se necese.]
Aktuale mi ne povas trovi la eldonon “Nature’s Way” kiu donis ĉi tiun recepton.
Ĉielarkan sanon. Pamela Fenton (Trevor provlegis)








FUNERAL RITE AND CELEBRATION OF THE LIFE OF

ANTHONY JOHN GASKELL

18TH MAY 1940 ~ 30TH JANUARY 2013

La 5an de Februaro 2013

Funebro de Anthony Gaskell

Venis ĉirkaŭ 170 amikoj.

Ne estis sufiĉe da segoj. Kelkaj staris malantaŭe

Estis budhisma ceremonio

14 Esperantistoj ĉeestis

Abid	Afridi	**Max**	Wearing
Alan	Turvey	**Mei**	Springer
Eunice	Graham	**Nicole**	Else
Ian (Jano)	Wylles	**Rainer**	Kurz
Igor	Couto	**Roger**	Springer
Jane	Graham	**Tim**	Wade-Ferrell
Matthew	Maguire	**Volo**	Gueltling





















